

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la svisa kurtunda radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond pri « Esperanto en Svislando dum 1962 ».

Kun korpremo mi devas komenci tiun prelegon anoncanta al vi la morton de Charles Ecabert, kies voĉon vi aŭdis dum kelkaj elsendoj. Lin elektis Edmond Privat kiel anstataŭanton ĉe la radio. Hodiaŭ, post kelkaj monatoj, la svisa kurtunda radiostacio jam funebras sian novan kunlaboranton. Estas terura frapo, pri kiu ni reparolos en la venonta elsendo. Ni esprimas al lia vidvino kaj al liaj du filinetoj nian kundoloron kaj simpatian.

La svisaj Esperanto-Tagoj okazis en Bazelo la 10-an kaj 11-an de marto. Laŭ la raportoj de la prezidantoj de la diversaj fakaj movadoj ni povis konstati, ke la svisa esperantistaro montris tre vastan aktivecon dum la pasinta jaro. En francalingva Svislando kolektiĝas subskriboj en la celo trudi esperanton en la lernejojn. La sekretaria laboro de Svisa Esperanto-Societo estas reorganizita laŭ plej moderna maniero por permesi efikan laboron. La svisaj esperantistoj elspezas multe da mono por nia afero. Dum 1961 ili aĉetis ĉe la esperanto-librejo librojn por 6'400 frankoj (tio faras 20'000 stelojn) kaj entute ili elspezis 16'000 frankojn por la movado. Tio estas konsiderinda sumo, kiu faras 50'000 stelojn. Radio-Beromünster intervjuis Alfred Bader, la prezidanton de la bazela grupo kaj Arthur Baur, kiun la aŭskultantoj de tiuj elsendoj bone konas. Kontaktkunveno permesis prezenti al ĵurnalistoj kaj edukistoj la eblecon solvi la internacian lingvo-kaoson pere de esperanto. Edmond Privat, malgraŭ la graviĝo de sia malsano akceptis veni rakonti siajn personajn rememorojn. Li parolis pri sia vizito al Zamenhof. Li rakontis pri la fama filozofo Ernest Naville, unu el la unuaj plej eminentaj subtenantoj de esperanto, pri sia amiko Hector Hodler, pri siaj vizitoj al la usona prezidanto Teodoro Roosevelt kaj al la itala reĝo Viktorio Emanuele.

Post tiu prelego Edmond Privat ankoraŭ trovis la forton iri al oficiala inaŭguro de la nova elsendejo de la svisa kurtunda radio por prezenti sian anstataŭonton kaj registri siajn lastajn prelegojn. Lia lasta porpaca kontribuo estis prelego, kiun li donis al siaj svisaj kvakeraj geamikoj. Poste oni devis urĝe transporti lin en la hospitalon, kie li mortis la 12-an de aŭgusto post grandaj suferoj.

Sed ni menciuj aliajn manifestaciojn. La grupo La Chaux-de-Fonds iniciatis intergrupan renkontiĝon, kiu okazis la 17-an de junio en la ĵurasa paŝtejo sub belaj abioj. Kvindek da svisaj kaj francaj gesamideanoj ĝuis pri tiu kamparana aranĝo. Kun plezuro ni salutis tie nian novan redaktoron Charles Ecabert. Sur la fotoj ni vidas lin, kiu piknikas kun siaj edzino kaj du filinoj. Li estis plena de projektoj por la venontaj renkontiĝoj. Sed fakte li ankoraŭ nur povis prelegi ĉe la Eŭropa Feriosemajno, kiu okazis de la 2-a ĝis la 8-a de septembro en Oberbalmberg apud Soloturno. Jam dum la SES-regionaj kunvenoj oni devis anonci lian teruran malsanon. Ni tamen esperis je revido post resaniĝo. Sed la paralizo estis pli forta ol nia volo.

Kiel vi konstatas, 1962 estis funebra jaro por la svisa esperantistaro. Ni tamen parolu pri kuraĝigaj faktoj.

Pli ol 50 ĉeestantoj ĝuis en Lausanne pri la prelegtalento de s-roj Piron kaj Vatré, ĝenevaj samideanoj. Ili alterne prezentis faskon da rimarkoj kaj ideoj pri interesaj aspektoj de la evoluo de nia lingvo. Dum tiu regiona kunveno de SES, kiu okazis la 27-an kaj 28-an de oktobro ni povis konstati, ke en Lausanne funkcias vigla loka grupo.

La posta semajnfino de SES okazis en Sankt-Gallen la 10-an kaj 11-an de novembro. Gesinjoroj Maurico de Sassi, Heidi Baur kaj Bruno Graf prelegis pri interlingvistikaj demandoj. Dum la sama semajnfino la esperanto-edukistaro kunsidis en Avenches kaj Faoug. Pro la malsano de ĝia prezidanto Charles Ecabert la prelego pri « Helvetio en la romana civilizo » devis esti anstataŭigita de prelego pri Edmond Privat, lingvisto.

Esperanto-Edukistaro kun Esperanto-Junularo aranĝis alian semajnfinojn, kiu la 22-an kaj 23-an de septembro kondukis dudekon da esperantistoj sur la supron de unu el la plej belaj ĵurasaj montoj : sur *Le Mont Racine*.

Hodiaŭ malfermiĝas en Adelboden, fama skistacio en alpa paradizo, la esperantista skirestado. Ĝi daŭros ĝis la 4-a de januaro kaj permesos al partoprenantoj alkurintaj el plej diversaj Eŭropaj landoj festi la komencon de nova jaro en samideana atmosfero. El Adelboden ni diras al vi, karaj aŭskultantoj, niajn plej korajn bondezirojn por la baldaŭ komenciĝonta jaro 1963.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond, la sekretario de Esperanto-Edukistaro de Svislando pri « Esperanto en nia lando dum 1962 ». Ĝis reaŭdo !

-oOo-